Mesaĝo de Universala Esperanto Asocio okaze de la Internacia Tago de Amikeco, la 30-a de julio 2024

Amikecon oni povas kompreni kiel formon de solidareco kaj rekono: amikecon inter homoj, amikecon inter popoloj, amikecon inter landoj kaj inter kulturoj. Temas pri valoro de la homa spirito, esenca por daŭrantaj paco, sekureco kaj evoluigo: per amikeco ni konstruas fortikajn ligojn de konfido.

En la nuntempa mondo, en periodo de kreskantaj konfliktoj kaj gravaj internaciaj defioj, kiam ni emas atesti pli da akuzoj ol da kunlaboro, oni eble supozus, ke paroli pri amikeco estus iluzio. Tamen, kiel prave komprenis Unesko okaze de sia fondiĝo antaŭ 79 jaroj, se oni volas konstrui daŭrantan pacon, oni devas konstrui ĝin en la mensoj de homoj, en la intelekta kaj morala solidareco de la homaro.

La Internacia Tago de Amikeco memorigas pri niaj plej noblaj aspiroj: ĝi invitas nin al internacia dialogo, solidareco, interkompreniĝo kaj repaciĝo. Ĝi sekvas la ideon, lanĉitan de Unesko, de kulturo de paco: tio estas disvolvi valorojn, sintenojn kaj kondutojn, kiuj rifuzas perforton kaj trovas pacajn vojojn al kunvivado.

Kiel asertas la koncerna rezolucio de la Ĝenerala Asembleo de UN, labori por amikeco kreas pontojn inter komunumoj, kaj kapablas fortigi la principojn de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj la Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Ni rememoru nian homecon, kiu kunligas nin “sendepende de raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato”.

Por ni, parolantoj de la internacia lingvo Esperanto, la tago estas speciala ankaŭ ĉar ĝi okazas tuj post la Tago de Esperanto, la 26-a de julio, kiam ni festas la amikecon inter homoj el la tuta mondo kreitan pere de Esperanto. Universala Esperanto-Asocio uzas tiun lingvon por proksimigi la homojn, antaŭenigi internacian interkompreniĝon, kaj festi diversecon.Kaj ni povas montri sukcesojn tiurilate. Ni celas krei kulturon de paco ne nur en la Tago de Amikeco sed tra la tuta jaro – cele al mondo en kiu konfido anstataŭu militon kaj amikeco ebligu kunlaboron por pli stabila estonteco.